

# INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA  
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare  $\frac{1}{2}$  Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :-

## La fajrego reekbrulas.

### Al la tutmondaj proletarioj!!

Karaj fratoj!! Post sesmonata buĉado, kiam oni esperis, ke la paco restariĝos kaj la homa sangverŝado, por la kapricoj de kelkaj politikuloj, estis fine ĉesonta, jen ke la tuta terura koncerto rekomenciĝas pli kruele kaj pli sovaĝe.

Post kiam sur la batalkampoj pereis dekoj kaj dekoj da miloj de niaj fratoj, antaŭenpuŝitaj de la bulgara oligarĥio en konsento kun la serba, greka kaj montenegra, jen nun ankaŭ la rumana oligarĥio deziras havi sian parton en la „liberiga” milito.

Post kiam la funebro etendiĝis sur ĉiuj balkanlandoj, la diplomatio, senpova kaj malkapabla, anstataŭ restarigi la pacon, provokis novan militon.

Ebriaĵo pro „la gloro” de l' milito, la kunbatalintoj, anstataŭ dece dividi inter si la rabajon, disputis ĝin unu al alia, kaj por solvi la malpacon vidis nur unu rimedon: nova perforto, nova sangverŝo.

Aliparte, la rumana oligarĥio, ĵaluza pro la fi gloro de Bulgarujo, eltrovis argumenton, bazitan sur falsaj motivoj, por rabi al Bulgarujo teritorion, kiun ĝi pretendas esti necesa por fortikigo de sia landlimo.

Profitante la okazon ke la kunbatalintoj interdisputas pri la rabajo, kaj motivante, ke Rumanujo estas malrajtigita ĉe Peterburga konferenco, ĉar oni ne cedis al ĝi la tutan postulitan teritorion, la rumana oligarĥio decidis riski la aventuron. Heroe ĝi decidis ŝteli al la sendefenda najbaro pecon de lia tero.

Preskaŭ neatendite la mobilizado estis ordonata kaj nun centmiloj da homoj estas devigataj preni la armilojn en la manoj kaj „en la nomo de la kruco“ sin ĵeti sur kontraŭulo, kiu ne povas defendi sin.

En kelkaj horoj nur la voko al milito estis disvastigata ĝis en la plej fundaj kaj mizeraj vilaĝoj kaj la popolo en-vokata por „fari sian devon al la patrujo“.

Sen scii la kaŭzon, sen scii kie kaj kun kiuj ili batalos, centmiloj da laboristoj, sen sia volo, forlasis la kamplaboron, la fabrikejojn, la laborejojn, por iri tien, kie la „fi-devo de la patrujo“ ilin vokas!

La tuta vivo de la lando estas paralizita.

Familiaj patroj kaj filoj estas devigataj forlasi ĉion kaj postlasi, en la plej nigra mizero, edzinojn, infanojn, maljunajn gepatrojn kaj gefratojn.

La frenezeco de militarismo ne plu havas limojn. Viroj ĝis 43 jaraĝaj estas en-kazernitaj. En la stacidomoj la doloreg-esprimoj estas nepriskribeblaj kaj silentigas la falsan, artefaritan entuziasmon por milito.

La vagonaroj ne plu sufiĉas por ilin transporti.

La soc.-dem. partio faris sian devon ĝis en la lasta momento por haltigi la militan kurenton, sed sensukcese.

La danĝero estas grandega!!

En la nomo de la internacia frateco kaj solidareco, vi, tutmondaj kamaradoj devas fari la eblon, malpermesi ke la fajrego etendiĝu, kaj por la homa interbuĉado fine ĉesu kiel eble plej rapide!

Kamaradoj, jen la momento montri vian pacamon kaj vian solidarecon!

Estas sankta devo, ke la tutmondaj kamaradoj kaj ĝiaj organizacioj urĝe prenu la necesajn mezurojn por eviti tut-eŭropan militon, kiu ŝajnas naskiĝonta.

Per viaj lastaj energipovoj, batalu por paco, organizante mitingojn kaj demonstraciojn, en kiuj partoprenu ĉiuj, junaj kaj maljunaj, organizante eĉ ĝeneralan strikon, por protesti kontraŭ la diplomatio kaj la oligarĥio.

Fratoj, la fajrego furiozege brulas en la apud-danubaj landoj. Unuvoĉe, kamaradoj, krii:

**For la milito!  
Vivu la paco!**

E. N.

P. S. La tuta socialista gazetaro estas petata represi la alvokon.

## La liberigita sklavo.

Estis iam homo, kiu havis multe da sklavoj, ĉar li estis tre riĉa.

Inter tiuj sklavoj estis unu maljuna, grizhara viro, kurba pro peza laboro. Li preskaŭ neniam parolis, kaj neniam ridetis.

Filo de sklavo, li estis sklavo deposedita de la naskiĝo. Lia patro, tamen, estis, laŭ oni diris, libera homo — la mastro de lia patrino. Eble pro tio vivis en li deziro al libereco. Kiam li estis juna, li estis obstina, protestema; ofte li penis instigi la aliajn sklavojn al ribelo, kaj ĉiam klopodis mal-kontentigi ilin. Pro tio li ofte estis severe punata; kaj fine, li submetiĝis, ĉesis batali. Tamen, li ege suferadis, ĉiuhore de l' tago kaj nokto. En soleco li ĝemis: Kial estas la unu mastro, la alia sklavo? Kial povas la unu apliki la vipon, dum la alia devas kurbigi la dorson?

Pasis la jaroj. La sklavo iĝis maljuna, malforta; por kiu ajn laboro li fine ne taŭgas plu.

Tiam la mastro iutage havis noblan eksenton; ĉar li vidis, ke tiu sklavo ne plu estis utila al li. Do li lin vokis al li kaj lin diris:

— Ci servadis mian patron kaj min, dum cia tuta vivo. Nun ci estas maljuna, malforta; ci nun ĝuos ripozon. Mi donacas al ci liberecon. Ci povas iri kien ci volas. Jen mil dukatojn. Estu feliĉa kaj uzu bone mian donacon.

Tiam la maljunaj okuloj ploris larmojn de ĝojo. La sendenta buŝo penis eligi vortojn de danko.

La mastro demandis: — Kiel ci uzos la liberecon?

La liberigita sklavo ekrigardis kaj diris: — Mi estas maljuna kaj eluzita. Mia vivo estis vivo de sklavo, la plej amara, la plej maldolĉa sorto. Mi ĝisnun nur laboris kaj suferadis. Nun mi volas ripozi.

— Kaj la mono — kion ci faros kun la mono, kun la mil dukatoj?

Ĉirkaŭ la lipoj de l' grizulo aperis — eble por la unua fojo dum lia vivo — rideto de feliĉo.

— Unue, li respondis, mi aĉetos al mi sklavon!...

## Por kio?

Sur batalekampo. Estas nokto. La luno klare lumigas vunditojn kaj mortintojn.

Petro: Ĉu ci vivas ankoraŭ, Stojan?

Stojan: Akvon!

Petro: Ci longtempe devos atendi. Sed, en mia botelo estas ankoraŭ iom da brando.

Stojan: Ĝin donu!

Petro: Mi ne povas; mia dekstra piedo estas forpafita. Per grenado. Ĝi krevis apud mi; mi falis kiel sako. Kion navas ci?

Stojan: La brusto... aeron! mi ne povas spiri... ĉu ni tie ĉi devas mortaĉi?

Petro: Se tiuj de Ruĝa Kruco ne baldaŭ venas... jen estas iu, sur ĉevalo. Heda! kie estas la niaj?

Voĉo: Ni okupis la altaĵojn. Eble ni morgaŭ havos Skutaron!

Stojan: Donu akvon!

Petro: Ni Montenegranoj estas herooj. Ĉu ci scias, frato mia, kiom da Turkoj mi hodiaŭ sendis inferen? Dudek! De unu, kiu volis pafi min, estis sammomente forpafita la makzelo... li ŝanceliĝis — mi pikis mian bajoneton tra lia korpaĉo, kaj per piedfrapo lin forigis de ĝi. Kiel porkojn ni ilin buĉadis. Ni estas herooj, frato.

Stojan: Petro, ci scias tiom multe... diru, kial ni tie ĉi tiel mortaĉas.

Petro: Precize mi ankaŭ ne scias tion. Kial ci ne legis la proklamajon de paĉjo Nikita?

Stojan: Mi ne scias legi.

Petro: Oni ja laŭtlegis ĝin ĉie!

Stojan (post paŭzo): Antaŭ ol morti mi tiom deziras vidi mian filineton; ŝi naskiĝis antaŭ ok tagoj.

Petro: Ci ne estas vera montenegra heroo, Stojan!

Stojan: Povas esti... oh, akvon, akvon.

La luno malaperas malantaŭ nuboj.

### Pri milito!

Ke la milito estus „Mater rerum”, patrino de ĉiuj aferoj, kiel certigis niaj praavoj, mi kredas nenion pri tio. Aŭ se ĝi estas patrino, ĝi tio estas laŭ modelo de Saturno: ĝi manĝegas siajn idojn. Sed ĝi estas, ho ve, la granda fakto de la homaro, la reganto de ĉiuj grandaj okazintaĵoj de l' historio.

La milito estas bestega kaj malsprita kaj la saĝeco ĝin kondamnas. Ĝi estus neebla, se saĝeco regus la homojn. Sed

jen: ne estas la saĝeco, kiu ilin regas, estas la instinktoj, la puŝoj, la pasioj, tiom da korpaj funkcioj kontraŭ kiuj saĝeco havas malmulte, aŭ, plej bone, nenian influon. Per racionalaj argumentoj oni do atingos, kontraŭ milito ne pli ol kontraŭ ameco, jaluzeco, malameco aŭ malsato.

Ke ĉiuj laboregu por tiu malfacila tasko: edukado de l' homaro por ĝin farigi pli saĝa. La tagon, kiam saĝeco kaj prudenteco ĉie sukcesos, la militoj malaperos. Sed ne antaŭe.

MAX NORDAU.

El „Contre la Guerre” esperantigis L. B.

### Patriotismo.

Al la ordinara homo estas la patrujo tie, kie lin naskigis lia patro, lia patrino lin suĉigis kaj lia pastro lin konfirmis: al la komercisto, kie li povas friponmaniere havigi al si la plej altajn procentojn, sen esti senplumigata de la regno; al la soldato, kie la imperiestro pagas la plej bonan salajron kaj permesas la plej grandan insolencan (impertinentecon); al la instruitulo, kie li por siaj flatadoj plej multe rikoltas honoron kaj oron; al la honesta prudentema viro, kie plej ofte ekzistas libereco, justeco kaj humaneco. Tial trovas la lasta nur malofte sian patrujon.

A. V., München.

### Pelata ekster la „rondon familian”.

Dum unu el niaj kunvenoj unu membro anoncis la jenan: „Mi renkontis iun soldaton, li estas esperantisto kaj parolas sufiĉe flue esperante, li ĝin eklernis en „Liberiga Stelo” kaj por perfektigi en la lingvo li volus ekkoniĝi kun nia grupo.” „Se li estis en „Liberiga Stelo”, li do estas anarhiisto”, diris la vicprezidanto.

„Certe, li estas anarhiisto”, opiniis alia grava membro de nia grupo.

Kaj tiun saman vesperon oni decidis demandi la estraron de la soldato opinion pri li.

La sekvantan kunvenon la vicprezidanto anoncis, ke li ricevis letere la jenan respondon de la komandanto: „Al soldato Z. mi povas nenion riproĉi, sed mi ne havas rajton doni al vi, privata persono, sciigojn pri miaj subuloj”.

Tiam la estraro de nia grupo turnis sin al unu influa

esperantisto, kiu per siaj rilatoj povus havigi sciigojn pri la dirita soldato. La influa persono sendis tian respondon: „Je la morala vidpunkto oni povas nenion riproĉi al li, sed vi estu singardemaj”.

Tio estis la verdikto por la soldato. Oni decidis lin ne akcepti kaj ne havi rilatojn kun li, ĉar li povus kompromiti nian grupon.

Vane mi indigna protestis kontraŭ tiu maljusteco. Oni respondis al mi, ke mi, kiel alilandulo, ne povas kompreni la gravecon de ilia motivo.

Vane mi memorigis, ke laŭ la regularo membro de nia grupo povas esti ĉiu esperantisto sendepende de liaj politikaj kaj religiaj konfesoj, se li nur aprobas la regularon de la grupo. Vane mi pruvis, ke estas malĝuste, kondamni iun, sciante nenion pri li de li mem, kaj juĝi lin nur laŭ informoj de homoj nekonataj aŭ partiaj. Venkis perforto kaj maljusteco.

Do estas evidente, ke la burĝoj malhelpas nin ne nur kiam ni volas plibonigi nian ekonomian situacion, sed ankaŭ kiam ni volas perfektigi en tia neŭtrala afero kia esperanto, se ni volas eniri en grupon nur por perfektigi en lingvo.

Ni do devas aranĝi ĉie niajn sendependajn grupojn kaj kunvenadi aparte de la burĝaj kunvenoj. Sur ĉiu paŝo ni devas montri, ke ilia celo „fari en konsento unu grandan familion” estas mensogo kaj malsinceraĵo. Mi estas certa, ke kio okazas en N. okazas ankaŭ aliloke ĉar burĝa vidpunkto estas ĉie la sama.

Kiom valoras ilia „amo al vero” karakterizas la jena fakto ankaŭ el nia grupo.

Mi proponis al la grupo aboni I. S. R. Oni respondis al mi, ke oni ne povas do subteni ĉiun esperantistan organon.

Post kelka tempo oni parolis pri unueco inter esperantistaro — ke esperantaj jurnalaj ne devas provoki malpacon inter esperantistoj; ke ili devas servi nur al unu supra celo k.t.p. Mi tiam demandis, ĉu la „Katolika Esperantisto”, kiun abonis nia grupo, respondas al tiuj kondiĉoj.

Oni respondis al mi: „Tute ne, kontraŭe, oni eĉ trovas tie opiniojn tute ne aprobindajn, malĝustajn.

„Kial do la grupo abonis „Katol. Esp.?” mi demandis.

„Ĉar ni devas subteni esperantan organon” respondis la prezidanto!

M. KRAFT.

## Oro malaperanta.

En Sud-Afriko kaj en aliaj regionoj, kie la tero enhavas oron, laboras miloj da homoj por ekkapti tiun multdeziratan metalon.

El granda parto de l' oro trovita oni faras monerojn. Ora mono estas ĉie en la mondo la plej bonvena pagilo! Landoj, kiuj inter si komercadas, pagas unu alian precipe per oro.

Sed, ne ĉie la posedo de valoraĵoj estas sendanĝera. Estas ankoraŭ multe da regionoj, kie estas dezirinde, kaŝi, plej eble, ĉion, kion oni posedas. Mono estas plej facile kaŝebla, kaj la plej taŭga kaŝejo estas en tiaj cirkonstancoj, la tero. Ofte okazas, dum milito eĉ grandskale, ke la kaŝintoj, pro morto aŭ subita forkuro, ne povas repreni la kaŝitan monon, kaj ke li prenas la sekreton pri la kaŝejo kun si en la tombo.

Tiel okazas, ke la oro, je unu loko deprenita al la tero kun tiom da penoj, je alia loko remalsupreniras en la teron, eble por malaperi por ĉiam.

---

## La limako.

Limako, kiu loĝis laŭlonge fervojo, treege indignis pri rapidvagonaro, kiu ĉiutage tondre preterpasegis kaj ege ĝin ĝenis en ĝiaj agrablaj okupoj.

„Tion mi ne volas toleri pli longe”, diris la limako al si mem Kaj brave ĝi metis sin inter la relojn, etendante la palpilojn, kiam en malproksimaĵo la vagonaro ekaperis.

„Mi frakasos ĝin!” ĝi diris, plena je kolero.

La vagonaro proksimiĝis kaj tondre iris trans la malamikinon. La limako turnis sin kaj postrigardis kun sovaĝaj okuloj la malaperantan vagonaron.

„Ĝi ne kuraĝas!” ĝi kriis malestime. „Ĝi forkuras por mi — ĝi estas malkuraĝulo”.

Kaj ĝi eljetis sur la relojn tiom multe da muko, kiom ĝi povis.

La laborista movado renkontas sur sia vojo multe da tiaj limakoj.

---

## La kongreso en Bern.

Dum la lastaj Esp. kongresoj — en Antverpeno kaj en Krakovo — okazis kongresetoj de esp. socialistoj. Tiuj kongresetoj sin pruvis treege utilaj por nia Esp. movado. Krom tio estas, certe, grandega plezuro, esti dum iom da tempo inter si kun kamaradoj el multaj landoj. Por la progresemaĵ vizitantoj de l' Esp. kongresoj, tiuj kamaradaj kunvenoj,

certe, estas pli agrablaj ol la faroj de l' burĝaj Esperantistoj.

En Antverpeno kaj en Krakovo la k-doj trovis oportunajn kunvenejon senpage metatan je sia dispono de la loka soc. organizajo. Ŝajnas, ke en Berno ili mem devos ĉion aranĝi. Ŝajnas, ke en Bern estas neniu soc. esperantisto. K-do Jost en Zürich, kiu prenis sur si skribi pri tiu afero al la komitato de la laborista unuiĝo en Bern, ricevis por respondo: ke la komitato estas preta doni sian nomon por anoncoj kaj alvokoj celantaj propagandakunvenoj inter laboristoj. Plion oni ne povas (aŭ ne volas) fari.

Pri kunsidoj de ruĝuloj en Bern I. S. R. ricevis du sciigojn: 22/VI/'13. K. K-do. Laŭ decido de Esfio, mi petis la org. komitaton de la 9a kongreso en Bern, rezervi en la oficiala tagordo de la kongreso du kunvenojn por esp.-socialistoj. Mi ricevis jesan respondon de Saussure. La du kunvenoj okazos en la universitato de Bern. Aliaj neoficiaj anoncitaj kunvenoj povos okazi se bezone. Mi troviĝos en Bern kelkajn tagojn antaŭ la kongreso. K-do povas adresiĝi al mi: Kongreso de Esperanto, Bern, A. Hermant.

24/VI/'13. La komitato de „Liberiga Stelo” sciigas la gekamaradojn, ke ĝi petis ĉambron, por ke la ruĝuloj povu kunveni, kaj ke la kunveno estu anoncata en la oficiala programo. La organiza komitato de l' kongreso kontentigis nin tute kaj sciigas, ke la kunsido okazos en la universitato, verŝajne sabaton la 30an, 8.30 matene. Ke la gek-doĵ ĉeestu multnombre. *La Komitato de „Liberiga Stelo”.*

K-do D-ro Ant. Czubrynski skribas: „Al la verdsocialistoj vojaĝantaj al Bern mi rekomendas tralegi mian artikolon pri la „socialistaj kunvenoj dum la Oka” („Esperanto” 20 XI 1912. Nr. 134, paĝo 316), kie oni havas koncize enpresitajn decidojn de la kunvenoj verdsocialistaj dum la Oka. El ili estas videbla, ke dua punkto tute ne estas efektivigita. pri la tria mi ne scias ion detale skribi. Sekve mi opinias, ke tre grava estus ta propono: „Verdsocialistaro devas havi ian ekzekutivon, t. e. komision zorgantan pri la efektivigado de la decidoj kongresaj, por ke ili ne restu nur decidoj senfortaj”.

Mi proponas ĝin, kiel unu el la programpunktoj de Bernaj verdsocialistaj kunvenoj, ĉar plejverŝajne mi ne estos en Bern.

Estinta aranĝinto de krakovaj verdsocialistaj kunvenoj  
D-ro ANTONI CZUBRYNSKI, Kraków. Dietta 881 p.

La sekretario de la sekcio de Sotteville-les-Rouen de „Liberiga Stelo” (Asocio de la Esperantistoj progresemaj, fondita 1906) sciigas ĉiujn disajn liberigstelanojn kaj sekciojn, ke li akceptas la mandatojn kaj prezentos la proponojn, kiujn oni sendos al li, antaŭ la ruĝula kongreseto. Sin turnu al:

F. M. STRUB, 77 Rue Lafayette, Rouen, Francujo.

**Nomaro de l' partoprenontoj:** F. M. Strub. Rouen, 77 Rue Lafayette — Duchemin, 12 Rue Bremontier, Rouen — Karl Richter, Leipzig Stötteritz, Sommerfelderstr. 44 — Hans Springer, Metzlersroute C. Gefrees, Oberfranken, Bavarujo.

### Pri kongreso kontraŭ prostitucio.

Komence de Julio okazis en Londono la 5a internacia kongreso kontraŭ la komerco je virinoj. La burĝ-presaro donis fanfaronajn raportojn. Iu korespondanto de socialista organo juĝas jene pri tiu kongreso:

La kongreso havis tre altan protekton. Ĉiuj delegitoj estis estimataj apogiloj de nia estiminda socio — dukinoj, grafinoj, episkopoj, predikantoj el ĉiuj religioj, oficiroj de l' Savadarmeo, poliestroj, altaj oficistoj, reprezentantoj de ĉiaj moralsocietoj.

Estas kompreneble, ke serio senfina da akceptoj kaj festmanĝoj estis la ĉefa laboro de tiu kongreso. Nur malmulta tempo restis por kunsidoj.

Kaj kiaj kunsidoj! La parolantoj, unu post alia, legis aŭ laŭdiris perkere sian opinion. Neniu atentis. Nenia diskutado. Ĉiu rajdis sian propran lignan ĉevaleton. Laŭ unu: la leteroj „poste restante” estas la ĉefkaŭzo de l' prostitucio; laŭ alia: la anoncoj en la gazetoj. Ĉiu estis apud kaj malsuper la problemo. La tuta spektaklo elspiris la odoraĉon de morala aroganteco kaj de bonfaradosporto.

La tuta kongreso, unuanime, nur sciis du kuracilojn: religio kaj polico.

Neniu penso moderna estis aŭdata en tiu kongreso. Kun timo preskaŭ ridinda oni evitis tuŝi la sociajn kaŭzojn de l' prostitucio. Kiam la aŭstria delegito Gärtner volis klarigi, ke la radikoj de tiu malsano estas: la mizeraj sociaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj, la malbonaj loĝejoj, la nescio, la ekspluatado al virinoj, tiam tuj la malprogresaj, kontraŭmoderna kunveno sin sentis treege ofendata, kaj en ĉiaj lingvoj oni, indigna, protestis: fine, la gesinjoroj per ega kabalo nebligis al la aŭstria delegito daŭrigi sian paroladon, la solan, kiu penis penetri al la koro de l' afero.

En la privataj konversacioj sin manifestis la opinioj de tiuj socion-savantoj ankoraŭ pli bele. Germana predikanto rakontis; se la germana imperiestrino vizitas akuŝejon, tiam oni metas edzinoringon al la fingro de senedzaj patrinoj; ĉar ŝia imperiestra moŝtino ja ne devas ekscii la ekziston de afero tiom terura: virino kiu naskas infanon ekster edzeco!

La angla ĉefrabeno komunikis, ke en Rusujo hebreaj studentinoj nur tiam povas enskribigi sin en la universitatoj, se ili sin metas sub kontrolo de l' moralpolico kiel publikulinaj kaj tiamaniere akiras la rajton de loĝado. Sed tiu komunikado ne malhelpis la kongreson akcepti la inviton: tiam oni sekventan kongreson en Peterburgo kaj veni tie voŝtoflirti kiel hundoj antaŭ la caro.

Kaj tia hipokriteco organizita povus alporti savadon al la „falintaj fratinoj“?

## SOCIA MOVADO.

### El Bohemujo.

El juĝejo. — Cent tri soldatoj de 102a piedregimento estas kondamnitaj.

Pasintan jaron, fine de Novembro, estis transportataj rezervistoj de 102a Praha piedregimento el Benešov. En stacidomo de Benešov unu majoro donis iun ordonon, kiun la rezervistoj, laŭ ekzemplo de kelkaj suboficiroj, ne volis obei. La liberulo Petrjilka, korporalo Hrdlička kaj soldato Vaneček, diris dum tiu ĉi okazo al tiu majoro kelkajn insultojn. En Mostar tuj post alveturo estis la rezervistoj per tuta bataliono forkondukataj en malliberejon. Nun ili estas kondamnitaj: Petrjilka en malliberejon je tri jaroj, Hrdlička kaj Vaneček je du jaroj; 67 rezervistoj ricevis malliberpunon po 20 tagoj kaj 33 soldatoj po 15 tagoj.

El gazeto „Čas“ de 23 julio 1913 tradukis EM. BATEK RIČANY.

### El Franclando.

Vi mortu por havi respublikon! En mia lasta raporto mi diris: La respubliko maljuniĝis. Tio eble restis enigmo. Do mi klarigas.

Oni ĉiam prezentas la respublikon en la formo de juna, aminda virino.

La kamaradoj, daŭre laborantaj por la plibonigo de la socio, diras: „Kiel bela estis nia Mariano dum la Imperio!“

Nun ŝi forĝis siajn adorantojn! Ŝi forĝis, ke ŝi ŝuldis

la vivon al tiuj, kiujn ŝi malamegas nune. Ŝi fariĝis publikulino.

Oni prezentas ŝin hodiaŭ kiel dika virinaĉo, kun okuloj pentritaj, sur la vizaĝo sulkojn, kaj ŝia brako en tiu de renegato kiel Briand, irante al festenakcepto ĉe fama financisto.

Tial ŝi maljuniĝis!

Longe oni diris, ke por la bono de l' popolo, laŭ ĝia deziro oni agis. Tiu peno ne plu ekzistas — aŭ tiom malmulte!

En la jaro 1905 nova leĝo faris la militsklavecon dujara.

Tiam la demokrataj deputitoj estis fieraj pro sia armeo, ĉu la soldatoj ne estis la plej fieraj, noblaj, kuraĝaj, la unuaj en la mondo?

Ĉu niaj armilfabrikantoj ne faris la plej perfektajn armilojn? Dum en Germanujo estis kartonaj kanonoj!

Ĉiel oni tiam diris, rediris, ke dujara militservado sufiĉas.

La soldatejoj estas lokoj, kie oni mortigas la iniciativon de l' junulo. Tie oni lernas obei konvene. Poste oni respektas ĉian leĝon, ĉiun mastron.

Ĉu dum du jaroj oni ne sukcesis bestigi la junajn?

Mi ne scias. Sed nova projekto nuliganta la 1905an leĝon estas prezentita.

En Germanujo la situacio ŝanĝiĝis. Ĉe la Germanuj-Aŭstruja landlimo, la aŭstraj soldatoj iris suden, lasante la gardon al sia germana amiko. Tial Germanujo plimultigis, volis plimultigi, sian soldataron, por anstataŭi la aŭstrojn.

Tiu preteksto estis bona. Ĉar en Francujo la loĝantaro estas malplinnombra ol en Germanujo, por havi multe da soldatoj ĉiuj taŭguloj estas akceptataj.

Por havi ankoraŭ pli da ili, por respondi al la minacoj de Germanujo — kiu minacis plivole tiam Rusujon — estis nur unu rimedo. Refari trijaran militservadon.

Nia glora armeo ne estis edukita, unuvorte, ĉiuj ecoj, kiujn ĝi havis, ne plu estis.

Sed se la armeo ebligas seniniciativigi la junulojn, ĝi ebligas riĉiĝi al fabrikantoj, Tiel ekzemple, nia militministro Etienne (Etjen') estas prezidanto de socio en Havre. Tiu socio faras kartuĉojn por la armeo. Malbonuloj diras, ke la disputoj pri la prezoj estas tiel maloftaj ke...

Alia ekzemplo. Antaŭ kelkaj jaroj, du firmoj konkuris por la pli malalta prezo por fabriki kanonveturilojn. Unu proponis dek mil frankojn, la alia dek tri mil. Tiu lasta havis la mendon.

Oni ĵus sciigis, ke nia fama 75 milimetra kanono kaj la motoro „Gnôme“ estas venditaj al Germanujo, Patriotismo de

riĉuloj, kiuj instigas la malriĉulojn kontraŭbatali reciproke!

Tamen tiu nova — ree — leĝo ne estas agrable akceptata de la soldatoj.

Ili protestis per ĉiu rimedo.

La registaro akceptas nur la manifestojn de aprobo, diskuti leĝprojekton estas krimo.

Ne nur la soldatoj estas malliberigitaj amase, sed ankaŭ la civitanoj.

Traserĉoj okazis en 88 urboj je la sama mateno.

Estas dirite, ke la Konfederacio de l' Laboro estas kulpa, oni parolas malstarigi ĝin.

Oni diras ankoraŭ multe da tiaj stultajoj.

Unu fakto persistas. En demokratio la civitanoj ne plu havas rajton diskuti leĝprojekton. La registaro estas sklavmastraro.

Kiu estas kulpa; ĉu la ministroj? ĉu la deputitoj? Ĉu la popolo, kiu pro sia sinteno havas la registaron, kiun ĝi meritas?

K-do Nutters citis la opinion de Nettlau en la „Temps Nouveaux” de 19 de Aprilo.

Li rapidas kapti ideon, kiu konvenas al li. Se li estus leginta la sekvantajn numerojn, li estus vidinta ke oni povas pensi alimaniere ol Nettlau, bazante sin ne sur ŝajno sed sur faktoj.

La leĝo referanta la militservadon trijara estas akceptita de la deputitaro, malgraŭ la penoj de Jaurès interne, kaj la volo de la soldatoj ribelintaj, kaj tiu de la laboristaro ekstere.

Mi jam parolis pri la manko de libereco. Nu! ĉio estas preterpasita, ĉiun novan tagon.

Post la malliberigoj, la traserĉoj, tiam, kiam ĉio hejme kaptita de la policistoj montris ke neniu dokumento pravigis la arestojn.

Ĉio montris ke tiu agmaniero estis politika, ĉar la nuna registaro estis ŝanceliganta, ĝi tiel firmigis sian potencon.

Broŝuroj verkita de Jaurès 1), afiŝoj eldonitaj de speciala komitato por la defendo de la soldatoj, kies anoj estas Anatole France, Octave Mirbau, kaj aliaj literaturistoj, estis kaptataj.

La rajte surglui afiŝojn sur la murojn estas nuligita, ĉar malgraŭ la leĝa formo de la skribaĵoj, la afiŝaj impostoj

1) En tiu broŝuro estas lia parolado farita en la deputatejo.

pagitaj, la afiŝistoj estas arestitaj, la afiŝoj estas forŝiritaj laŭ superaj ordonoj.

La registaro provas elmontri ke la ribelo de la soldatoj estas la rezultato de komploto farita de la Konfederacio de l' Laboro.

Registoj estas tro stultaj por kompreni ke la perspektivo de unu plia jaro estas terura por junuloj. Sed niaj ministroj, eĉ nia armea ministro, ne estis soldatoj.

Tiuj riĉaj sinjoroj ne defendas mem siajn proprajojn; ĉu la popolo ne estas sklava, en nia lando de libereco, frateco, egaleco? Ironio!

Okaze de kunveno en Paris de la francaj sindikatoj, grava mitingo estis aranĝita ĉe „Le Pré St. Gervais” kie kunvenas, subĉiele, la popolo.

Pli ol 60 paroladistoj parolis al la amasego. Ili estis sindikatistoj, socialistoj, anarkiistoj.

Sed la protestoj ne sufiĉas, kaj la laboristoj devos sin prepari por pli efika ago, aŭ ili estas malplifortigitaj.

La anarkiistoj bezonante de tempo al tempo kunveni por registri la profitojn aŭ la perdojn de la lastaj jaroj, aranĝas kongreson okozontan la 15an, 16an kaj 17an de Aŭgusto en Paris.

La organiza komitato diras en sia alvoko:

„La utileco de tia manifestado estas elmontrinda... la kapitalismo kunigas sian tutan forton por nuligi la laboristan organizadon. Estas necese ke pli intima kunigo de niaj penoj igu pli vigla nian kontraŭstaron, kaj pligravigu nian potencon de propagando kaj de ago.

... Precizigi la anarkiistan penson, ĝin esprimi klare, por ĝin diskonigi en la amason popolan, tia estas la tasko efektivegebla de la anarkiista kongreso.

Jen la tagordo:

1. La organizo de la anarkiistoj; la ag- kaj propagandrimedoj.
2. La lukto kontraŭ militarismo.
3. La sindikatismo kaj la anarkiistoj; la ĝenerala striko.
4. La ago kontraŭparlamentisma.
5. La elvojiĝoj; la individua repreno; la scienca manio.
6. Diversaj demandoj; la infana edukado; la kaso por persekutitoj; la estonta internacia kongreso.

Malbonulo kiu estis en la socialista partio, kies nomo estas Wilm, kaj kiu promenadis en aŭtomobilo kun rene-

gato Briand estas eksigita el la partio. Tion petis lia urba grupo, kaj la federacio de l' departemento de Seine.

Tiu sinjoro estis en amikaj rilatoj kun la strikkomitato de la fervojistoj dum la fama striko de 1910.

Li estis konsilisto. Oni povas suspekti kial la striko malsukces, pro la sinteno de la komitato, kaj la furiozeco de Briand.

La nacia konsilantaro juĝos lin baldaŭ.

Tiu purigo estas aprobinda, la partion gajnos moralecon.

A. PANLOU.

La senpera agado. (Fino.)<sup>1)</sup> — Tiel aperas la bonfaranta rolo de sindikatismo, ĝiaj rektaj konsekvencoj estantaj pligrandigi la konscion de l' proletario, kaj lin voki al pli intima partopreno en la produkto, kies unu el la esencaj agantoj li estas.

Samtempe kiam ĝi celas malkonstruan laboron, la sindikatismo laboras al plimultigo de la sociaj riĉaĵoj, en proporcio mem je la luktoj, kiujn ĝi ekfaras aŭ kiujn ĝi elportas. Ĝi kontraŭstaru al mastrara atako aŭ ĝi alproklamu la batalon, la proletario aganta laboras por pligravigi, kune kun sia forto de konsumo, sian forton de produkto, ambaŭ neapartigeblaj. Je la fluo de sia senpera agado, la laborista klaso, eĉ nevole, obeas tiun elementan leĝon, kaj la malbonintenca interpreto de la gazetaro al ĝia ĉiutaga lukto, restas senpova por falsi kaj malgravigi la vastiĝan forton de sindikatismo.

Tiu forto estas tia, ke ĉiu medio sentas ĝian ekpremon; kaj tiuj diversaj medioj trovas firman bazon de sia ago nur ĉe la reguloj mem de l' senpera ago.

La necesa solvo de la konfliktoj povas nur esti se la penoj inspiras sin de la sindikatisma ideo, sinonimo de progreso, en la vico de la produkto kiel en tiu de la konsumo.

La „senpera ago” nea je ĉia providenco, estas resume la reakcio inteligenta de l' proletario sur li mem, sur la medio kiu ĉirkaŭas lin, kaj ĝi estas per tio mem aganto de socia progreso.

LÉON JOUHAUX,

Sekretario de la Konfederacio Ĝenerala de la Laboro.

1) Vidu n-ojn 2an kaj 3an 1913.

### El Meksiklando.

L' Eŭropaj registaroj rekonas oficiale la Kanibalaron de Huerta-Diaz. — De kiam mi skribis mian lastan artikolon por I.S.R. — 28an Februaro — l' aferoj en Meksiko jam ŝanĝis multe, kaj por rakonti l' okazintaĵojn, mi penos esti kiel eble plej lakonika, pro la negranda amplekso de tiu ĉi revuo.

La registaro, kies estro estis Taff kaj kies reprezentanto en Meksiko estis Henry Lane Wilson, donis moralan subtenon al la mortigintoj de Madero, ĉar tiu ĉi agadis ekster kontrolo de usonaj plutokratoj.

Feliĉe por la demokrata afero, la nordamerika popolo elektis progresemulon kiel prezidanto, kaj tiu ĉi havis la kuraĝon ne rekonigi registojn, kies oficialaj oficoj estas akiritaj per perfido kaj mortigado. Do, la nuna usona registaro ne premas ankoraŭ la sangokovritajn manojn de Huerta.

Kiam unue oni legas en niaj ĵurnaloj, ke la Brita registaro baldaŭ rekonos la „leĝan Meksikanan registaron” oni pensis ke ĝi estis simpla fantazio de la ĵurnalistoj, sed ĝi veriĝis...

George V sendis al Huerta aŭtografan leteron; Poincaré faris same, kaj poste la aliaj Eŭropaj registoj rapidis rekonigi „la bonan kaj grandan amikon!”

Huerta kaj siaj senhontaj partianoj dancadis pro plezuro!

Ankoraŭ mia kapo turniĝadis, kiam alvenis la dua surprizo: la pruntodono da Sm. 200 000 000 de francaj kaj holandaj bankistoj.

„Britujo savis nin”, diras la blindaj ŝovinistoj, kriegante samtempe kontraŭ la usona popolo. „Eŭropo amas nin, kaj tiu ĉi amo estas produkto el la kleraj cerboj de la „patriota” Huerta kaj la „patriotega” Diaz. Iru diablon Usono. Bojkotu ni la nordamerikanajn produktaĵojn”. Tiu ĉi, pli aŭ malpli estas l'opinio de mia estimataj samlandanoj, kiuj pensas kaj pripensas per la piedoj.

Tamen, tiuj kiuj ne facile blindiĝas antaŭ la kapitalistaj hipokritajoj, trovis tre nekompreneble, ke Britujo, tiel fiera pri sia noma kiel civilizita lando, estis la unua, kiu rekonis la soldataĉon Huerta kiel leĝa prezidanto; kaj ankaŭ trovis sufiĉe strange, ke la sinjoroj bankistoj pruntodonis la monon al tiuj ĉi kanibaloj, dum estas fakto bonkonata, ke la fama paco, kiun promesis Huerta por la 21an Junio 1913, en granda festeno ĉe klubo de niaj „aristokrataj” nenionfarantoj, estas mito.

Ĉu oni vere estis tiel naiva por kredi, ke individuoj ne-



kulturitaj kiel Huerta, malsaĝaj ambiciuloj kiel Felix Diaz kaj senskrupulaj helpantoj de tiranoj, iĝas post tri monatoj, mirindaj ŝtatistoj? Tute ne. Sed, la brita mistero estas solvita.

Lord Cowdray posedas, jam de la tempo de la „glora maljunulo” Porfirio Diaz, grandajn petrolkampojn en diversaj ŝtatoj de tiu ĉi lando, sed kiel Diaz havis nerompeblajn kompromisojn kun la Usonaj plutokratoj, li ne povis doni al sia angla amiko specialajn koncesojn.

Prezidanto Wilson ne estas granda amiko, kiel Taff, de la Reĝoj de la Dolaro, kaj Huerta ne sukcesis per la Porfirio Diaz’ politiko, korvinki Wilson pri la rekonigo. Tiam Huerta sin turnis al Lord Cowdray kaj tiu ĉi „Blusangulo” volonte akceptis laboradi antaŭ sia registaro por akiri la rekonigon de Huerta, ŝanĝe, kompreneble, de la promesitaj koncesioj, ktp.

La milionulo Cowdray sukcesis kaj Huerta faras kion li povas por kontentigi sian personan savanton.

La angla kapitalistaro jam sendis jurnalraportistojn por havi intervjuojn kun la Kanibalaro kaj verki flatantajn artikolojn por ili.

Tiel oni trompos la britan popolon.

Por la sinjoroj kapitalistoj la estonteco de popolo, la homara progresado ne estas afero kalkulinda; por ili nur ekzistas mono, ĉar ili scias, ke per ĝi oni povas aĉeti eĉ honoron.

Milionoj da enlanduloj meksikanaj, kiuj de l’ epoko de la Hispana konkero — 1520 — estis veraj sklavo de la ekspluatantoj civilaj kaj ekleziaj, pezas neniom sur la konscienco de „monfarantoj”; por ili, ju pli krima kaj tirana estas registaro, des pli ĝi estas bona kaj honorinda.

Eble baldaŭ ni konos la misteron pri la „sindonemeco” de la francaj kaj holandaj kapitalistoj. Atendu ni.

L’ a r m m o v a d o d a ŭ r a d a s. — Kelkaj ĉefaj urboj estas jam en la manoj de revoluciistoj, kaj la movado kreskas ĉiutage. Ne estos miro se antaŭ du monatoj Huerta, Diaz kaj kompanio jam iris renkonti la saĝan Porfirio Diaz en Eŭropo aŭ estos pendigitaj je ia telegrafa fosto.

Tamen mi ne estas optimista; la konduto de nia popolo dum la Madero regado elrevigis min multe, kaj la faligo de tiuj ĉi mortigantoj ne estus certe la fino de la revolucio kaj maltrankvileco. Post tiom da longjaroj da subpremado kaj manko da intelekta evolucio, por eligi la radikojn oni bezonas ankoraŭ la multkostajn lecionojn de spertado.

Se por atingi progresadon kaj starigi ĝiajn fundamentojn estas necesa la daŭrado de la nunaj maltrankvilajoj, tiam ili estas tute akcepteblaj. Kio devas okazi morgaŭ, tio okazu hodiaŭ. La sango de Madero, Pino Suarez, Gonzalez, Bassó, Mendoza kaj multaj aliaj, oferigataj sur l’ altaro de la Dio de tiuj ĉi soldataĉoj, fruktdonas, malgraŭ la influo de la petrolputoj . . .

GENARO E. TERRUES.

Meksiko, la 13an de Junio 1913.

### El Portugalando.

„Terra Livre” („Tero Libera”), anarĥ. organo en Lisbono, enhavas en sia n-ro de 17 de Julio, artikolon: „Por la viktimoj de l’ despotismo en Portugalujo kaj por la respekto al la rajtoj de l’ homo”. Per tiu artikolo, verkita france kaj portugale, la organo sin turnas al la presaro, al la klasoj laboristaj kaj al la liberpensuloj en la tuta mondo. La artikolo diras i. a.:

La persekutoj al la laborista organizado de la flanko de l’ regantoj de respubliko Portugala atingis la apogeon kun la enpotenciĝo de Afonso Costa, la ĉefulo de l’ tielnomata grupo demokrata.

Ĉie en la lando la aŭtoritatuloj de la respubliko plenumas la plej hontindajn perfortajojn — ili disigas societojn laŭleĝe fonditajn; ili malliberigas gvidantojn je plej bagatelaj pretekstoj; ili elpensas kontraŭ ili plej ridindajn akuzojn.

En provinco Alentejo ili, kun plej granda malrespekto de la konstitucio de l’ respubliko, atakas kaj fermas arbitre sindikatojn kaj kooperativojn, forprenante la kontolibrojn; ili arestas grandnombron da laboristoj, kiujn ili sendas al la malliberejoj en Lisbono por tempo nedifinita, kontraŭe al la leĝaj fundamentoj de l’ respubliko.

En Lisbono, ega krizo de laboro, tuŝanta ĉiujn industriojn, kreis inter laboristoj malesperan situacion. La regantaro reduktis, por la sennombraj laboristoj en publikaj laboroj, la laborsemajnon al tri tagoj. Ĝi do liveris siajn laboristojn al mizero kaj al malsato. La laboristoj, indignaj, protestis — la regantaro fermis tuj la Domon Sindikatan, je nepre senbaza preteksto de politika ribelo; ĝi subpremis la journalojn revoluciajn. Dum grandega kunveno en la ĉefurbo, aranĝita de la ĉefurbaj konsilantoj, por protesti kontraŭ la pliigo de la luprezoj, la 50.000 konvenintoj solidariĝis kun la protestoj de la laboristoj kontraŭ la persekutoj farataj al ili de la registaro de Afonso Costa. La arbitro duobliĝas. Ĉiuj journaloj

de l' opozicio estas subprematoj; la laboristoj povas apenaŭ ankoraŭ kunveni — la liberoj de presado, de kunvenado, ne plu ekzistas.

Estas en tiu ĉi atmosfero de terorismo, ke la 10an de Junio, dum la pasado de jubilea procesio je honoro de Camoens, eksplodis bombo inter laboristoj, portantaj nigran standardon kun surskribo: Panon aŭ laboron! La karbonaristoj de Afonso Costa, tuj post la eksplodo, ekbruligis kunvenejon ofte vizitatan de laboristoj, kaj atakis la Domon Sindikatan, en kiu ili ĉion frakasis, kun konsento de la potenco publika.

La proksiman tagon la polico arestis la plejkonatajn gvidantojn de la laboristoj. Ili ĝisnun estas en malliberejo, kvankam neniu pruvo kontraŭ ili estis trovebla, kaj kvankam oni kulpigas de la faro 16 junulojn. La burĝa presaro grandparte silentas, pro timo esti subpremata. Kio restas al ni farebla en tiu atmosfero de terorismo, kreita ĉirkaŭ la organizajoj laboristaj?

Nur tio: fari aŭvokon al la presaro internacia kaj protesti kontraŭ la arbitro de l' demokrata registaro, kiu sufokas ĉiujn rajtojn garantitajn de la konstitucio, kiu fermas laŭleĝajn asociojn, kaj kiu tenas en malliberejo, laŭ la volo de Afonso Costa, sen proceso kaj por tempo nedefinita, laboristojn honestajn kaj konsciajn, kiuj luktas por la emancipado de l' proletariato.

Kaj tion ni faras per tiu ĉi kaj ni esperas, ke nia protesto trovos eĥon en la mondo civilizita: ke ĝi provokos en la presaro, en la organizajoj laboristaj kaj inter la liberpensuloj, fortan agadon kontraŭ la arbitron, kiu regas en Portugallando.

### El Rusujo

Medicina helpo en siberiaj vilaĝoj. — Medicina helpo en siberiaj vilaĝoj estas tiel mizere, tiel malbonege, tiel abomene aranĝita, ke ĝi kvazaŭ ne ekzistas; kaj egalas nulon. Mi priskribos la medicinhelpon en du regionoj, kie mi antaŭe servis kaj nun servas, el kio vi konkludos, ke miaj ekzemploj ne estas esceptoj, ĉar mia unua paroĥo estas loko sufiĉe „kultura“. Kaj se tie la afero estas abomene aranĝita — kion diri pri la aliaj lokoj!

Antaŭe mi servis en vilaĝo Doronino, ĉe la bordo de rivero Ingoda, je 150 kilometroj de Ĉita, ĉefurbo de Transbajkalo, 50 kilometrojn de Doronino estas vilaĝo Tanga, post kiu estas la limo de Mongolujo. Do, de Tanga ĝis Ĉita la distanco estas 200 kilometrojn, kun 24 vilaĝoj kaj por tia granda regiono kun pli ol 60 miloj da loĝantoj ekzistas nur unu

kuracisto kun du helpantoj. Kaj ne opiniu, ke en la vilaĝoj ekzistas malsanulejoj, bonaj apotekoj — ne, tie ekzistas nur mizeraĵ etaj apoteketoj kun nur kelkaj kuraciloj: ricinoleo, „tanalbinum“ k.t.p. por tia granda klientaro! Ho, se vi deziras vidi malsanulejojn, apotekojn, kuracistojn, akuŝistinojn, ne veturu en niajn vilaĝojn, ĉar tie loĝas ne homoj, sed, kiel ironie diris generalo Dragomirov, „la sankta griza bestaro!“ Se vi deziras vidi la veran medicinan helpon, iru en la urbojn kaj urbegojn — tie vi trovos sufiĉe da diversaj medicinaj „uloj“ kaj „istoj“, kiuj zorgeme kuracas ĉiujn malsanojn, eĉ malsanojn de diino Venus. Sed kion bezonas la „sankta griza bestaro?“ Nur bestkuraciston! Ĉu ne? Kaj se vi atente rigardas niajn vilaĝajn medicinajn „istojn“ kaj „ulojn“, vi sufiĉe trovos inter ili bestkuracistojn — ĉar alie mi ne povas ilin nomi!

Niaj reguloj estas tiaj, ke eĉ la plej ideala medicinisto nenion povas fari por la bono de l' malklera popolo, ĉar 1e la laborkampo estas vastega, 2e la kuraciloj mankas, 3e la malklereco de popolo multe baras. Kaj tial multaj kuracistoj aŭ foriras aŭ . . . . drinkas, drinkegas! Kaj kiel ne drinkegi pro malĝojo kaj konscienciproĉoj, kiam multegaj homoj mortas sen ia medicinhelpo. Do mankas kuracisto, mankas helpantoj, mankas kuraciloj plej necesaj, mankas ĥirurgiloj por operacii, oni ne havas la ilaron por akuŝo k.t.p. Ne sufiĉis dum somero de 1911 jaro la ricinoleo, mankis la fervoro de variolkuracisto; dank' al tio multe da infanoj kaj eĉ maturaj homoj mortis je variolo en nia nova nuna paroĥo Ŝergolĝin! Kio estas en „apoteko“, tio estas je duono netaŭga, difektita, ĉar el urbo medicinista inspektoro sendas ne tion, kion oni bezonas kaj postulas en vilaĝan apotekon, sed tion, kion oni ne bezonas, nek postulas.

Ĉu ne estas tia „brutaro“ nur materialo por eksperimentoj, por ekspluatado?

Pastro S.

### Laboristaro kaj lingvaj aferoj.

Mi ĉagreniĝis legante ia lastajn numerojn de nia Revuo, ĉar oni parolas en ili pri „lingvaj aferoj“, kiuj tute ne estas la celo de I. S. R.

Ĉar la revuo estas Esperanta, oni devas verki Esperante sen ia ajn disputo. Nia lingvo tia, kia ĝi estas konigita de la Fundamento, estas sufiĉega kaj taŭgas por ĉiuj bezonoj, por ĉiuj medioj.

De dek unu jaroj mi faris ĉiuspecajn tradukajojn kaj originalajojn esperantajn, nun mi zorgas pri scienca parto en iu esperanta gazeto, pri literatura parto en aliaj, kaj mi laŭte diras, ke mi neniam estis haltigata de malfacileco aŭ de neebleco, kaj mi verkas nur **Fundamente**. Do, kiam lingvo taŭgas por sciencoj kaj beletristiko, ĉu ĝi ne povas ankaŭ taŭgi por la laboristaj aferoj?

Ŝajnas al mi, ke k-do Chaloupecky ne bone komprenas kio signifas: ni uzu sen ŝanĝo la gramatikon kaj la vortojn de la oficiala vortaro (Boirac); se bezonata radiko ne ekzistas en ĝi, kaj se ni ne povas formi la bezonatan vorton el oficialaj radikoj, tiam, kaj nur tiam, ni kreu radikon sed laŭ la fundamentaj principoj.

Do, estante „fidelisto-fanatikulo“, „verdstela ŝovinisto“, oni havas la rajton evoluigi la lingvon. Nur ion ni ne devas fari: ŝanĝi.

Ni memoru, ke Volapük mortis la tagon, kiam iuj volis fari reformojn. Ido neniam vivis pro la idista reformemo. Infano ne povas vivi se iun tagon oni ŝanĝas brakon, alian oni anstataŭigas intestojn, alian oni pligrandigas aŭ malgrandigas la koron. Sed se oni greftas kruron aŭ orelon, aŭ okulon, eble tiu nova membro aŭ organo ne vivos sed tamen la infano vivados. Same pri lingvo.

Mi estas fundamentisto, kaj tamen, antaŭ 7 jaroj en I.S.R. mi proponis, kaj de tiam uzis, tri afiksojn kaj multajn novajn radikojn por niaj bezonoj. Multaj el ili estas nun ĉies uzataj; kelkaj estis forlasitaj. Jen la evoluo kaj la vivo. Bonajo daŭras, malbonajo mortas... reformemo mortigas.

Ni do konservu tia nian Esperanton; multjara sperto pruvis, ke ĝi taŭgas por ĉio. La laboristoj ne estu pli postul-emaj ol la sciencistoj kaj la literaturistoj.

FI-BLAN-GO (L.-K.), unua redaktoro de I.S.R.

Mi ĝojis vidi la kuraĝan eksplodigon de la superstiĉo pri „fideleco al la fundamento“ de kamarado Chaloupecky.

Jes, ankaŭ Esperanto-patriotismo estas neprograsa, same kiel alispeca patriotismo.

Pri la „fidela fundamentisto“ mi ja multon legadis de post kiam mi koniĝis kun la lingvo Esperanto. Mi dum longa tempo miris pri tia homo, sed ne prosperis al mi renkonti lin aŭ liajn verkojn. Unu tagon mi okaze promenis kun fremda Esperantisto. „Povas esti ke li estas „fundamentisto“, mi enpense diris. Ho ve! Kiam ni interparolis mi

rimarkis ke li tute ne parolas laŭ la krestomatio fundamenta, kaj ke sur liaj lipoj svarmis neoficialaj vortoj. Post iom da tempo mi diris al li: „Jam de longe mi serĉis en ia vasta mondo iun“.

„Kio estas? Ĉu vi perdis fraton?“ li diris.

„Ne mi ne perdis iun, mi neniam vidis la serĉaton, sed mi scias ke li devas ie ekzisti“.

„Ha, vi volas koni vian patron“, li diris divene.

„Ne... fundamentiston“, mi intermetis.

„Kion? Vi serĉas fidelan fundamentiston?“

„Nure simpla fundamentisto kontentigus min. Ĉu vi konas tian?“

„Mi mem estas fidela fundamentisto kaj ĉiam kontraŭparoladas la reformistojn“, li fiere respondis.

„Permesu ke mi rimarkigu al vi, amiko mia, ke vi estas per via lasta vorto pli prograsa „plibonigisto“ ol mi mem, kaj „duon-Idisto“ oni nomas min“.

Depost tiam mi ankoraŭ serĉis... tamen sensukcese.

\* \* \*

Mi plejparte konsentas al la rimarkoj de kamarado Chaloupecky, sed bedaŭrinde li ne konsilas kion fari.

Ŝajnas ke la konsilo de prof. Bourlet en la junia „Revuo“ estas bona, nome; ke nia akademio laboru, i. a. ke ĝi donu al ni difinojn en Esperanto, ĝi klarigu al ni la diferencon inter komunuma, komunisma, kolektivisma, sindikata kaj kooperativa; inter regno kaj ŝtato; inter ĵurnalo, gazeto kaj revuo, k.t.p., k.t.p. Ĝi ankaŭ donu Esperante difinojn kun ekzemploj de ĉiuj elastaj vortoj, ekz. „lasi“.

Ni socialistoj memoru ke se povas ekzisti Esperanto-patriotismo, tiel same povas esti socialismo-patriotismo.

Ni memoru ke se homo ne estas socialisto, tio ne sekvigas ke li ne estas lertulo pri lingvaj aferoj.

Nia lingvo ne povas evolui per si mem, ĉar nun ĝi ne uzigas sufiĉe internacie rilate al literaturo, komerco kaj ĉiutaga vivo; kaj ne estas juste ke malgrandaj nacioj, kiuj ĝis nun apenaŭ konis la lingvon, ne influu ĝin.

Do, nia akademio laboru.

TAGULO.

---

## ESPERANTA MOVADO.

---

Kun ĝojo ni komunikas al vi, ke en Bilbao, inter la laboristaro, Esperanto progresas.

Kiam ni komencis lerni ĝin, preskaŭ ĉiuj ridis, eĉ oni nomis nin frenezuloj. Ne timigis nin tiuj sensecaĵoj, kaj rigardante nur nian celon, persistis por poste lernigi al niaj kamaradoj nian karan lingvon. La akiritaj rezultoj pravigis nin, kaj tiuj kiuj antaŭe nin insultis, hodiaŭ estas devigataj jesi, ke Esperanto estas taŭga ilo por unuigi ĉiujn laboristojn, ĝi forigante la lingvolimojn. Ne estas necese nomi sin Franco, Ĥino, Hispano kaj tiel plu, por esti feliĉa, nur estas necese esti Universanoj.

Nia grupo enhavas 80 membrojn, el kiuj scias paroli nian lingvon 35, la aliaj helpas nian propagandon, kotizante ĉiu-semajne 4 spesdekojn.

Nuntempe ni havas du kursojn; kaj de ili eliros tre fervoraj esperantistoj, kiuj aliĝos al nia grupo.

Nia kara I. S. R. estas legata avide, kaj ĉiun numeron plezure oni atendas: nun oni vendas 25 numerojn sed de la venonta numero 30 kaj kredeble baldaŭ estos necese plimultiĝi.

Manpremojn por ĉiujnaciaj samideanoj,

JUAN GRACIA, Prezidanto.

**Alvoko.** — Samideanoj! La Laborista Komitato Internacia konsentis publikigi Bultenon, raportantan pri la laborista movado en ĉiuj nacioj. Ni petas al ĉiuj laboristoj, kiuj apartenas en societoj aliĝintaj en la Internacia Komitato, faru same ol ni, proponu ke la dirita bulteno aperu, krom angle, france kaj germane, ankaŭ esperante.

Kamaradoj, faru tion kion ni petas kaj esperanto multe progresos.

LA ESPERANTISTA GRUPO SOCIALISTA DE BILBAO.

Hungarlanda Esperantista Societo Laborista estas la titolo de societo, fondita antaŭ kelkaj monatoj en Budapeŝto. Tuj post la fondo la societo aranĝis 5 kursojn, al kiu ĉeestis pli ol 120 gelaboristoj; tiuj kursoj ĵus finiĝis kun kontentiga sukceso. La komitato de l' suprenomita societo nun preparas grandan propagandon por la proksima vintro, kaj celas fondi grupojn en tuta Hungarujo.

Neniu laboristo devos ignori la ekzistadon kaj kialon de Esperanto!

Ligo Verdsocialista en Belgujo. — Kamaradoj! Konsiderante la veran popolan vidpunkton kaj la Internacian celon de Esperanto:

Konsiderante la laboron de multaj katolikoj en Belgujo, kiuj deziras fari de Esperanto sklavaĉon de sia religio;

Ni, socialistoj kaj esperantistoj, estas starigontaj en nia urbo Bruselo *socian grupon*, kaj ni volas krei tra la lando socian ligon. Eble ni sukcesos — sed, helpu nin. Ĉiu socialisto, ĉiu grupo, estas petata sendi al ni ideojn pri propagando kaj malgrandan resumon de la grupaj statutoj. Ni tre deziras koni la adresojn de ĉiuj grupoj. Antaŭan dankon! Ĉar ni estas certaj ke vi helpos nin.

Estas ja grava demando, kaj helpante nin, vi helpos tutan socialismon de Belgujo fari novan progreson por la estonteco.

Ĉiuj komunikadoj estas sendotaj al unu de la ĉi subaj adresoj:

E. HAINE, 1065 Chaussée de Mons, Anderlecht, Belgujo.

R. DE LEENER, 69 Rue Neuve, Bruxelles, Belgujo.

**Protesto.** — La soc. rev. gazeto „Der Pionier” en Berlino, Germanujo. Stralaŭerplatz 18—19, enpresis antaŭ monato artikolon de mi, en kiu la soc.-rev. junularo estas alvokata, ke ĝi nepre kaj senprokraste lernu Esperanton.

Per cito de diversaj gazetoj jam uzantaj Esperanton (ekz. „Ĥina Socialisto”), mi klopodis pruvi, ke la kolegaro je la unua sindikalista kongreso okazonta en Londono, nepre bezonos lingvon por plene kompreniĝi.

En poŝtkribajo la redakcio de „Der Pionier” mokis pri Esperanto malvarme, kaj eĉ ĉiujn internaciajn „lingvaĉojn” jetis al la diablo. Ĝi ne kredas, ke oni per tia lingvo sin perfekte komprenos.

Je mia dufoja protesto je tiu artikolo-poŝtkribo, mi ricevis admonon lerni antaŭe la germanan lingvon (mi estas svisa romano) kaj propagandi inter kolegoj. Ke mi la redakcion priskribos en diversaj gazetoj, pri tio, „ili nur povas ridi” estis la respondo. Ĉiu verdruga k-do nun estas devigata sendi al tiu gazeto proteston, se nur estas poŝtkarto, por ke „Der Pionier” konvinkiĝu, ke Esperanto jam estas uzata inter socialistaro. La kongreseto en Bern faru la saman!

VIKTOR STRASSER.

## KORESPONDADO.

**Rusujo:** K-do N. Krassovskij, termezuristo, en urbo Uia, gub. Ĉertejnaja, dez. kor. pri lingvaj demandoj, pro enketo interŝanĝas opiniojn pri sufiksoj oz, iz, iv, kaj pri ebla utilo de enkonduko interŝanĝi tradukojn de naciaj rakontoj, fotografajoj.

**Ĥinujo:** S-ro Sifo, c/o Mr. Tsang, Standard Oil Co., Shameen, Canton, China, dez. kor. pri anarĥismo kaj ĝia movado.

**Germanujo:** Kamaradino Elsbeth Petschke, Breitestr. 3, Cottbus, dez. kor. kun geeksterlandanoj per il. pk. kaj letere: tuj respondos. — K-do Bernh. Süsse, Wickedestr. 2711, Lübeck, dez. kor. kun k-doj el ĉiuj landoj; ĉiam resp. — K-do August Rehse, Capellenstr. 7, Hannover-Kleefeld, dez. korespondantojn kiuj intencas daŭre skribi; ne pk.-kolektantojn.

**Hungarujo:** K-do Nagy Jozsef, Palotai u. 31, Székesvehérvár, dez. kor. kun gek-doj el ĉiuj landoj.

**Aŭstrio:** K-do Fr. Kopecky, Klosterneubgstr. 47, III Stiege 46, Vieno XX, dez. kor. per il. pk.

Ĉu fraŭlino Jonas en Parizo kaj la k-doj Frant. Ĉefek en Vieno kaj Max Molinus en Hannover ne ricevis poŝtkartojn de k-do De Bruin en Lonnéker, Nederlando? Bonvolu respondi.

Diversaj aliaj k-doj plendas pri ne sufiĉaj respondoj.

**ANIAJ KALKULOJ.** — En kaso la 28an de Aprilo 219.59 guldenojn. Ni ricevis: en Parizo (francojn): Turré 3.50, Grupo Esp. en Valencia 2.50, J. Habert 1.25, Raimond 0.25, Wiedemann 0.25, Jeannin 3.60, Nerson, 8.15, Gilbert 0.20, Cachon 2.50, vendo ponumera 1.80, kune 28 fr. = 13.73 guld. En Amsterdam (guldenojn): Kaiser 4.80, Wandert 3.75, Toth 5.30, Letz 1.20, Mozer 3.40, Süß 2.90, Ludewig 5.62, Berggren 1.50, Markoviĉ 5.20, Jahn 11.50, Zimmermann 2.02, Franc 7, Regen 1.20, Schmiedel 6.28, Haensler 2.41, Boothman 4.02, Crowther 9.06, Almond 1.45, Goodliffe 2.50, Paulet 3.65, Denis 1.40, Jost 2.38, Romeijn 1.90, Deiters 2.95, Kespert 2.50, Parker 1.20, Dreyer 4.60, Guerra 2.16, Rebstock 1.76, Sholl 1.51, Storey 1.80, Yelland 1.20, de Bruin 1.23, Przybyszevski 1.40, Tyl 1.20, Tomljanoviĉ 1.20, ponumere 5.90, kune 120.95; entute 354.27 guld.

Elspezoj: en Parizo: sendo, kor. kaj diversaj 7.40 fr. = 3.66 guld. Preso de la 6a, 7a kaj 8a numero, sendo, korespondo kt p. 210 guld.; kune 213.66 guld.

Enspezoj . . . 354.27 guld.

Elspezoj . . . 213.66 „

En kaso . . . 140.61 guld.

La promesitan intertempan numeron de I. S. R., kiun la redakcio opiniis necesa, la administracio ne kuraĝis aperigi. K-doj, I. S. R. ne povas doni krediton por senlima tempo! Preskaŭ du mil ekzempleroj ne estas ankoraŭ pagataj! Se via konto kuras pli longe ol duonjaron, tiam tuj likvidu ĝin (escepte en la landoj militantaj) aŭ adm. devas ĉesi la sendadon.